

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 2

Aprilo/Majo/Junio 1985



29a GEFA-Jarkunveno en Lichtenfels 4a ĝis 6a de Oktobro 1985



Nia gasturbo

El urba prospekto

Aŭtuna vojaĝo al Frankonio

La ĉiujara kunveno de la Germana Esperanta Fervoĵista Asocio (GEFA) havas longan tradicion kaj ĝuas internacian reputacion. En 1985, de la 4a ĝis la 6a de Oktobro, la nordbavara urbo Lichtenfels gastame atendas la GEFA-anojn kun familianoj kaj aliajn geamikojn de la Internacia Lingvo.

Ĉirkaŭita de altaĵoj ĵurasaj en la ofte prikantita valo de la rivero Main, ĉe geologie kaj trafikgeografie distingita loko, situas la malnova frankonia urbo Lichtenfels, najbare al arkitektaj valoroĵoj kaj la iama benediktana monaĥejo, la hodiaŭa monaĥejo Banz, aŭ la barokstila pilgrimejo „14 Sanktuloj“, proksime de lokoj kun multsignifa pasinteco kiel Bamberg, Coburg, Kulmbach, Bayreuth, Kronach kaj Staffelstein. La poeto Viktor von Scheffel glore laŭdis la vastan valon inter Lichtenfels kaj la najbaran Staffelstein kiel „dian ĝardenon ĉe supra Main-rivero“.

Keltoj ekloĝis antaŭ 2700 jaroj, kion atestas trovitaĵoj en la montaraj kavernoj. Sed kio la nuntempajn vizitantojn precipe allogas, estas la romantika karaktero de tiu bonŝance ne tro granda urbo. Super la rava kuliso de la urbokerno leviĝas la kastelo el la 16a jarcento. La barokstilan urbodomon konstruis la fama arkitekto Justus H. Dientzenhofer, dum la preĝejo „Nia kara Sinjorino“ kaj la turoj kaj pordegoj estas tri jarcentojn pli aĝaj. Larĝaj, burĝaj domoj kompletigas tiun fascinantan bildon. Tamen en la loko ekzistas ankaŭ industriaj entreprenoj por la fabrikado de tekstiloj kaj mebloj. Unu metio gajnis mondvastan reputacion: la plektado de korbvaroj. Eĉ ŝtata faklernejo por la plektado, la unusola en Germanio, troviĝas tie. Pro tio Lichtenfels portas la kroman nomon „urbo de la korboj“.

La partoprenontoj de la 29a jarkunveno de GEFA trovos sufiĉe da hoteloj kaj restoracioj en la loko aŭ proksime al la urbo. Kongresejo estas la gastejo „Bergschloß“ (monta kastelo). Tie okazos ĉiuj aranĝoj kaj manĝoj. La kunvenejo estas atingebla de la stacidomo piede en 15 minutoj. Kiel kutime funkcios informejo kaj akceptejo en la stacidomo. Vendredon, la 4an de Oktobro, la urbestro akceptos la kongresanojn alvenintajn ĝis posttagmeze. Dum la distra vespero oni konatiĝos per diaprelego kun la

regiono. Dum sabaton antaŭtagmeze la funkciuloj de GEFA partoprenos la labor-kunsidon, la certaj kongresanoj vizitos la urbon kaj havos okazon aĉeti korbvarojn. Ekzistas ankaŭ la kutima ebleco fari la lingvan ekzamenon. Post la komuna frankonia tagmanĝo la aŭtobusoj startos al ekskurso tra la regiono. Vizitotaj estas la menciita monaĥejo Banz, de kie eblas mirinda rondrigardo. Dientzenhofer estis la kreinto ankaŭ de tiu grandskala konstruaĵo.

Vidalvide de la monaĥejo Banz, sur la alia flanko de la rivero Main, estas videbla la elstara fasado de la dutura baziliko „14 Sanktuloj“. Ankaŭ ĝi meritas nian viziton. La preĝejo estas konstruita same en baroka stilo per la ne malpli konata arkitekto Balthasar Neumann. La interno ofertas ĉiujn preciozajn elementojn de tiu artepoko. Kompreneble ne mankos survoje la tradicia kafopaŭzo. Fina celo estos la korbmuzeo en la vilaĝo Michelau. Ĝi montras la evoluon de tiu metio, kiu endanĝerigis perei dum la lastaj jaroj, sed nun denove ekfloras.



Monaĥejo Banz.

Vi povos admiri dum nia aŭtobus-ekskurso.

Por la komuna vespermanĝo la mastro promesas abundan bufedon. Kulmino de la jarkunveno estos la festvespero. Post salutvortoj al kaj flanke de la honorgastoj kaj eksterlandaj reprezentantoj dancgrupo kaj muzikistaro prezentos riĉenhavan frankonian programon. Por la dancemuloj

viglaj melodioj eksonos dum la sekvaj horoj.

La kongresanoj kolektiĝos dimanĉon matene por informi sin pri la lastjara agado de GEFA. La cetera tempo estos dediĉata al prezentado de filmo aŭ aliaj kontribuaĵoj. La kandidatoj por la lingva ekzameno plenumos la duan parton publike. Kiu ankoraŭ ne rigardis la instalitan ekspozicion kaj volas aĉeti Esperanto-literaturon, devos rapidi, ĉar

finiĝos la jarkunveno. Post la komuna tagmanĝo oni adiaŭos.

Certe tiu programo en agrabla kongresurbo, akompanote espereble per bona vetero, meritas multnombrian viziton. GEFA apelacias al ĉiuj, kiuj volas ĝui veran Esperanto-etoson, aliĝi kiel eble plej baldaŭ. La formularoj estas haveblaj per la distrikta komisiitoj.

Ĝis revido en la aŭtuna Lichtenfels!

W. B.

GEFA-Tagung 1985 im Land der Franken

Die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) lädt herzlich zu ihrer 29. Jahresversammlung (4. – 6. 10. 1985) in die fränkische Korbstadt Lichtenfels ein. Dieser romantische Ort am Obermain bietet alle Voraussetzungen für einen angenehmen Aufenthalt und ein gutes Gelingen. Preiswerte Quartiere stehen zur Verfügung. Im Kongreßgebäude, der zentral gelegenen Gaststätte „Bergschloß“, werden auch die gemeinsamen Mahlzeiten eingenommen.

Die Tagung sieht neben dem erforderlichen Arbeitsprogramm wiederum einen Empfang durch die Stadt vor, ein gemütliches Zusammensein mit Musik und Darbietungen eines Zauberkünstlers, Besichtigung des reizvollen, mittelalterlichen Stadtkerns, einen Busausflug mit Besichtigung des Klosters Banz und der berühmten Wallfahrtskirche Vierzehenheiligen sowie den Besuch eines Korbmuseums. Beim Festabend mit Teilnahme von Ehrengästen und ausländischen Esperantisten sind folkloristische Darbietungen zu erwarten. Anschließend wird getanzt.

Wiederum besteht Gelegenheit, eine Sprachprüfung abzulegen. Eine Ausstellung wird über Esperanto informieren, und ein Bücherstand wird Esperanto-Literatur anbieten. Zögern Sie daher nicht mit der Anmeldung, besonders wenn Sie sonst wenig Gelegenheit haben, Esperantisten aus dem In- und Ausland zu treffen. Anmeldevordrucke übersendet Ihnen gerne Ihr Bezirksbeauftragter. Also auf Wiedersehen im Oktober in Lichtenfels!

W.B.



Enirpordo al la iama monaĥejo „Klosterlangheim“ en la samnoma antaŭurbo de Lichtenfels.

Wie erreichen Sie Lichtenfels?

Lichtenfels liegt an der Schnellzugstrecke München – Berlin und der Eilzugstrecke Würzburg – Hof. Hier halten alle Züge.

El la fervoja historio de Lichtenfels

Friedrich List, la fama ekonomia sciencisto vivanta en la unua duono de la 19a jarcento, pledis jam en la jaro 1838, do tri jarojn post la unua fervoja veturo en nia lando, por la konstruo de fervojlinio inter norda kaj suda Germanio. Li skizis trakan reton, kiu kondukis tra Bamberg al München. Bedaŭrinde la ideo de hansabavara linio fiaskis unue pro spirita malvasteco de la reĝo en Hannover.

Tamen la projekto realiĝis. En 1856 la laboroj por la konstruo komenciĝis. Fine de 1858 la 150 km longa linio Eisenach – Meiningen – Coburg – Sonneberg estas transdonita al la publika trafiko. Tiu linio akompanas la riveron Werra ĉirkaŭ 80 km de nordo al sudo, pro kio ĝi ricevis la nomon Werra-fervojo. La lasta parto de la linio, la 13,5 km longa trako de la provinca limo ĝis Lichtenfels, ekfunkciis komence de 1859. En Januaro 1984 sekve la DB festis la 125jaran jubileon de ĝia ekzisto. La akcia kompanio Werra-fervojo disponis en 1859 pri 24 lokomotivoj, el ili 14 por la pasaĝertransporto, kaj 367 vagonoj, el ili 40 por pasaĝeroj. Unu el la 1858 konstruitaj lokomotivoj portis la nomon „Lichtenfels“.

En 1875 la kompanio starigis en Meiningen propran direkcion. La provinco Prusio aĉetis en 1895 la Werra-fervojon. La intertempe ŝtatan fervojon oni submetis en 1922 al la direkcio Erfurt. Depost 1929 ĝi estis parto de la unuigita Germana Regna Fervojo (DR).

Fortaj lokomotivoj el Prusio nun tiris la trajnojn ĝis Lichtenfels. La malnovan stacidomon oni deŝiris en la jaro 1935. La somera horaro de 1936 respeguligas la trafikajn signifon de la Werra-fervojo ligitan kun ekonomia ekfloro de la regiono. Eĉ dum da militjaro 1944 estas konstatebla konsiderinda trafiko de pasaĝer- kaj vartrajnoj. Ne mirinde, ĉar la fervojo estis tiutempe la plej grava transportilo.

Fine de la milito, en Aprilo 1945, la transportoj sur la reloĵ ĉesis. Kiel en la tuta lando multaj linioj kun pontoj kaj tuneloj estis detruitaj. La linio Neustadt – Coburg – Lichtenfels estas iom post iom rekonstruita kaj eĉ elektrizita en du etapoj. La stacio Lichtenfels ricevis modernan regadejon. Pro la kreo de du germanaj ŝtatoj la linioj situantaj en la Federacia

Respubliko Germanio nun apartenas al la distrikto de la direkcio Nürnberg. Lichtenfels plue estas grava stacidomo en Frankonio. W. B.

Filmo kaj Esperanto

Tiel tekstis artikolo de nia GEFA-membro W. Barnickel en la renomita film/fotorevuo „objektiv“ lastjare. En ĝi la aŭtoro ilustras la diferencon inter siaj kaj aliaj amatoraj filmoj. Per la ekskluziva eluzo de Esperanto en titoloj, dialogoj kaj komentarioj tiuj filmoj estas prezentablaj sen lingvaj bariloj antaŭ internacia spektantaro. La jarkunvenoj de GEFA profitas depost kelkaj jaroj de tiu laŭdinda aparta kunlaboro.

DB reklamas per Esperanto

La iama varboficejo de la Germana Federacia Fervojo, ĵus instalita en la novorganizita Centralo de la DB, konsentis kiel jam lastjare la aperigon de tutpaĝa anonco en la jarlibro 1985 de la Universala Esperanto-Asocio. En sia reklamo la DB turnas sin precipe al klientoj en transmaraj kaj eŭropaj landoj.

Die IFEF-Skiwoche 1986 findet vom 11. bis 18. Januar im Engadin (Schweiz) statt. Weitere Informationen folgen zu gegebener Zeit.

Für die Teilnahme am Weltkongreß 1986 in Peking haben sich bereits 4 Kollegen angemeldet.

Achtung: Ruheständler!

Die diesjährige Seniorentagung findet am Samstag, 7. September in Frankfurt/Main statt. Notieren Sie schon jetzt diesen Termin. Besondere Einladung erfolgt rechtzeitig.

Wir empfehlen die Teilnahme an der Sprachprüfung, die von der GEFA-Prüfungskommission am 5./6.10.1985 in Lichtenfels durchgeführt wird. Setzen Sie sich schriftlich oder fernmündlich in Verbindung mit: BAR Lautenbach, Bktr 5, Bf 640 Fulda; Basa (nur montags) 955/1693. Privat: Abtstor 21, 6400 Fulda. Ruf 06 61 / 7 76 27.

Tagung des Arbeitsausschusses Esperanto mit den Bezirks- und Sonderbeauftragten am 9. 3. 1985 in Würzburg.

Der 70. Esperanto-Weltkongreß findet vom 3. – 10. 8. 85 in Augsburg statt. An einem Sonderschalter der DB werden 4 aktive Kollegen unserer Vereinigung Dienst leisten. GEFA richtet für den 8. 8. 85 (allgemeiner Ausflugs-tag) einen Tag der Eisenbahner-Esperantisten aus. Nähere Hinweise über die „kontaktkunveno“ erscheinen in der nächsten Ausgabe.

Mit unserem Fernkurs (s. Bulteno 2 84) haben wir eine Esperanto-Marktlücke entdeckt und ausgefüllt. Im Bulteno 4/84 konnten wir den Verkauf von 20 Exemplaren ankündigen. Am 8. 3. 85 wurde der 127. Kursteilnehmer mit Unterlagen versorgt. Der Kreis der Mitarbeiter wurde entsprechend erweitert. Werben Sie im Freundes- und Bekanntenkreis für diese ausgezeichnete Lernmethode. Das gesamte Lehrmaterial kostet weiterhin nur 20,- DM. Einzahlung auf Postgirokonto 61150-466 in Dortmund von Joachim Schrapp, Schmittingheide 17 d, 4400 Münster/Westf. EDS-Adresse: DB-Schule 440 Münster. Bei Überweisung genügt das Stichwort „Fernkurs“.

1984 erschienen 75 Zeitungsartikel über Esperanto. 17 Mitteilungen wurden in Amtsblättern und BSW-Mitteilungen veröffentlicht. In 6 Ausstellungen wurde für Esperanto geworben.

Die Vorbereitungen für die JV in Lichtenfels – 4. bis 6. 10. 1985 gehen zügig weiter. Die Informationen über den Veranstaltungsort und die Veranstaltungen finden Sie auf den ersten Seiten dieser Ausgabe. Die Anmeldevordrucke wurden bereits mit Bulteno 1/85 verteilt. Bestellungen sind bereits eingegangen. Die 30. Jahresversammlung findet vom 10. bis 12. 10. 1986 in Oelde (BD Essen) – Strecke: Bielefeld – Hamm i. W. – statt.

Graß

Korespondanonco:

Magdalena Wroclawska - 14jara lernantino - Grabonóg 62/1, PL 63-820 Piaski, Pollando, deziras korespondi kun tuta mondo pri literaturo. Ŝi kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

Aus den Gruppen

Bremen

festis la 12an de Decembro 1984 la Zamenhoffeston kiel kutime en harmonia kaj agrabla kunesto. Gasto estis nia membro Fritz Busse el Hannover.

La jarkunveno okazis la 13an de Februaro 1985. La grupvespero 13. 3. havis la temon „La mondo estas plena de mirakloj“. La kunveno je la 17. 4. sub la titolo „Kio estas utopio“.

Dortmund:

Diavortrag „Lambarene und Serengeti“ 14. 1. und 28. 1. Weiterbildungsabend „Esperanto als Mittler der Weltliteratur“.

Frankfurt/Main:

Dum la fervojista ekspozicio „Ferphilex 84“ aranĝita en Montreux (Svislando), nia membro F. Mager ricevis medalon pro sia poŝtmarka kolekto pri Esperanto.

Münster//Westfalen:

La Esperanto-Societo festis Nikolao-festo la 6an de Decembro.

Fervojista Esperanto-Rondo Münster

Ni translokiĝis al nova kunvenejo. Vi trovas nin nun ĉiun ĵaŭdon de la 19.30 h en „BSW-Kulturraum“ ĉefstacio Münster (Westf) norde apud trako 21. Rekomendindas antaŭa sinanonco ĉe Guido Brandenburg telefono 02 51.51 12 49 aŭ Basa Münster (poŝte 0251.691) 5368! Ankaŭ programo estas tie ricevebla.

wbr

Wir begrüßen herzlich die neu geworbenen Mitglieder

Helmut Büthe, Bf Hamm Rbf und Alfred Dietrich, Betr.St. Bf Elsfleth (BD Hannover).

Alfred Dietrich hat sich durch unsere Anzeige in „Wir“ zum Beitritt entschlossen. Die Werbungen hat M. Retzlaff durchgeführt. H. Büthe lernt z. Zt. Esperanto in einem GEFA-Kurs.

Frau Irmgard Ballo, 4330 Mülheim/Ruhr-Broich, setzt die Mitgliedschaft ihres verstorbenen Ehegatten Josef fort.

Gordon Böhm, Bank-Azubi, 5804 Herdecke wurde von unserem Kollegen Herlitze erworben.

Ĉi-jare en Februaro ni realigis nian deziron, konatiĝi kun la

Kultura Centro Esperantista (KCE) en La Chaux-de-Fonds/Svislando.

Ni triope forlasis Münster (Westf) je la 8.03 h, trainŝanĝis en Basel kaj Biel kaj atingis La Chaux-de-Fonds jam je la 17.33 h. Traveturante la Svisan Jurason ni admiris la ravecon de la regiono. La Chaux-de-Fonds situas en alteco de 1000 m. Se oni uzas la urban aŭtobuson por atingi la KCE, oni ĝoje konstatas, ke ĉe ĉiuj gravaj stratkruciĝoj oficialaj ŝildoj indikas „Centre Esperantiste“. Malkovritio, oni sentas sin jam bonvenigita — oni forlasas la aŭtobuson ĉe la haltejo „Esperanto“.

La KCE situas en agrabla loĝregiono kaj konsistas el 7 kvarfamiliodomoj, konstruitaj en la jaro 1925. La KCE aĉetis tiujn domojn unu post la alia kaj estas okupita, renovigi ilin. Jam nun parto de ili estas instalita por loĝigi, gastigi kaj instrui. Speciale taŭgaj por loĝigi familiojn, estas la moderne instalitaj ferioleĝejoj. Du domoj estas kunligitaj per transirejo. En ili estas la oficejoj, la biblioteko, la presejo, studsalonoj, kuirejo kun manĝosalono kaj kelkaj gastĉambroj. Laboristoj estas okupitaj konstruante. Multaj laboroj estas ankoraŭ necesaj, por realigi la planojn.

Ni restadis en KCE por ferii en Esperantotoso. Proksime ĉe KCE oni trovas migroindikiloj, kiuj allogas por multaj diversaj migradoj tra la bela regiono dum vin'tro kaj somero.

Dum nia ĉeesto en KCE okazis kelkaj kunvenoj. Fakpedagogoj instruis en diversnivelaj laborgrupoj. Ĉiam ĝustatempe ni paŭzis memservante en gaja etoso kafon, teon ktp. Kulminoj estas la manĝadoj de svisaj specialaĵoj.

Vespere ni partoprenis interesajn prelegojn kaj lumbild-prezentadojn.

Ni konatiĝis en KCE kun Esperantistoj el Aŭstrio, Aŭstralio, Belgio, Danlando, Francio, Germanio, Hispanio, Luksemburgio kaj memkompreneble Svislando, inter ili estis multaj junaj homoj. Ni ne havis la eblecon, uzi la germanan lingvon.

Multaj Esperantistoj sentis sin dum la restado en KCE hejme, ankaŭ ni dank' al Claude Gacon kaj liaj kunlaborantoj.

USchr

Beim Ordnen alter Unterlagen hat der 1. Vorsitzende den interessanten Beitrag unseres verstorbenen Seniors

Reinhold Schmidt, Nürnberg entdeckt.

Der nachstehende Bericht mit unwesentlichen Änderungen dürfte auch heute noch lesenswert sein.

Mein 1. Esperantokongreß 1923 war von Hindernissen begleitet.

Ettliche Wochen vorher bewarb ich mich beim belgischen Kommandanten in Moers (Niederrhein) um einen Passierschein. Damals bestand die Ruhrbesatzung mit einem neutralen Streifen „Niemandland“. Einige Tage vor Fahrtantritt nach Nürnberg wollte ich die Bescheinigung abholen. Leider war der Kommandant in Urlaub. Da ich zusammen mit einem Freund unbedingt nach Nürnberg wollte, beschloßen wir, ohne die erforderliche Bescheinigung zu reisen. Es hatte sich herumgesprochen, daß man auch zu Fuß auf Schleichwegen durch das Niemandland kommen konnte, das war in Kohlfurt im Bergischen Land (jetzt NRW). Hinzu kam noch die Regierungsbeschränkung, im besetzten Gebiet keine „Regiebahn“ benutzen zu dürfen. Wir stiegen von einer Straßenbahn in die andere, um Solingen zu erreichen und dann zu Fuß weiterzukommen.

Ehe wir soweit waren, entstand in Düsseldorf noch eine kritische Situation. Als wir mit der Straßenbahn über den Kornelienplatz fahren, gab es einen lauten Knall. Es hatte ein Bombenanschlag auf die täglich aufziehende französische Wache stattgefunden. Unsere Straßenbahn blieb stehen. Sogleich strömten die Besatzungssoldaten mit gefälltem Bajonett heran. Nach einigem Aufenthalt erhielten wir das Zeichen zur Abfahrt.

Durch diese Umstände kamen wir 2 Tage zu spät in Nürnberg an, dort konnten wir erfahren, daß der Übeltäter ermittelt wurde. Das war wichtig für uns, denn nach dem Kongreß benutzten wir den gleichen Weg zum linken Niederrhein.

Weltweite Kontakte

Heinz Schindler teilt mit, daß er und seine Frau Hanna zum Jahreswechsel 142 Briefe bzw. Postkarten aus 25 Ländern erhalten haben, davon 83 von Esperanto-Freunden.

**Bundespräsident
übernimmt Schirmherrschaft über den
Esperanto-Weltkongreß in Augsburg,
03. — 10. August 1985**

Der Präsident der Bundesrepublik Deutschland, Professor Dr. R. von Weizsäcker, sandte an den Präsidenten des Esperanto-Weltbundes (Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam), Grégoire Maertens einen Brief, in dem er sich zur Übernahme der Schirmherrschaft über den Esperanto-Weltkongreß bereiterklärt. Der Bundespräsident macht in seinem Schreiben auf die völkerverbindende Funktion der Internationalen Sprache aufmerksam, indem er schreibt: „Die friedensstiftende Funktion von Esperanto dokumentiert sich nicht nur in der Sprache, sondern auch in dem Zusammentreffen ihrer zahlreichen Anhänger aus vielen Ländern und allen Berufen. Gern übernehme ich die Schirmherrschaft über den Kongreß, dem ich einen guten und erfolgreichen Verlauf wünsche.“

Zu dem Kongreß werden 2 000 Menschen aus 50 bis 60 Ländern erwartet. Um dem zu erwartenden Sprachenchaos bei DB-Stellen zu entgehen, hat das Kongreß-Komitee die DB um gleiche Hilfe gebeten, wie das bereits zweimal, in Mainz (1959) und Hamburg (1974) geschehen ist.

Mit Zustimmung und Unterstützung der DB und deren örtlichen Stellen in Augsburg wird daher die Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk im Kongreß-Gebäude einen DB-Stand einrichten und während der Kongreßwoche bedienen. Eine fünfköpfige Gruppe fachlich erfahrener, Esperanto-sprechender Eisenbahner wird den Kongreßteilnehmern in der Internationalen Sprache jede gewünschte Auskunft erteilen und in Zusammenarbeit mit der Fka Augsburg Hbf Fahrkarten, Sitz-, Liege- und Bettplätze vermitteln. 1974 in Hmb wurden über 2000 Auskünfte erteilt und 800 Fahrkarten verkauft. Nebenbei wird Werbung für die DB mit Hilfe einer eigens für diesen Kongreß aus DB-Prospekten zusammengestellten Esperanto-Information betrieben.

Eine zusätzliche Aufgabe dieses Teams wird sein, die im Kongreß anwesenden ausländischen Eisenbahner zu betreuen und ihnen im Hinblick auf das 150. Jubiläum der Bahn ein einschlägiges Programm zu bieten.

Mitglieder der BSW-Esperanto-Gruppe, Bez. Frankfurt sind bei der Einrichtung des DB-Info-Standes in Augsburg beteiligt und werden auch unmittelbar während der Kongreßwoche dort mitarbeiten.

Egon Kiefer

Tiu malbenita akuzativo!

La uzo de akuzativo por komencantoj ofte estas problemo. Kiam do uzi ĝin?

1. Kiel rekta objekto de transitiva verbo:
Elefanto havas longan nazon. Sin mi amas. Li ne komprenis tion.

2. Por esprimi celon de movo:
Mi iras hejmen. Ŝi iras en la kontoron. Muso kuris sub la liton. Li devis veturi Berlinon. (apud: Li devis veturi al Berlino).

3. Anstataŭ prepozicioj:

a) sopiras ŝin (je ŝi, pri ŝi), esperas tion (pri tio), sciigas lin (al li);

b) por indiki tempon (anstataŭ dum, en, je):
longan tempon (dum longa tempo), sep jarojn (dum sep jaroj), iun belan tagon (en iu bela tago), la 14an de Aprilo (je la 14-a de Aprilo);

c) por indiki mezuron (anstataŭ je):
2000 metrojn alta, 5 kilometrojn longa, 32 jarojn aĝa.

En ĉiuj aliaj okazoj estas uzata nominativo
El „Esperanto Informilo“ 7+8 1984

Die Rundfunkanstalten in der Europäischen Gemeinschaft sollten Sendungen in Esperanto ausstrahlen, forderte der Deutsche Esperanto-Bund zum Abschluß des 62. Bundeskongresses in Kassel. Schon seit 25 Jahren benutzt der polnische Rundfunk Esperanto, auch ein Dutzend weiterer Sender verwendet diese internationale Sprache. Im Hinblick auf den 70. Esperanto-Weltkongreß vom 3. bis 10.8. 1985 in Augsburg sollten vor allem deutsche Rundfunkanstalten Sendungen in Esperanto ausstrahlen.

Ferner hat der Esperanto-Bund die EG aufgefordert, „die Lösung der Sprachenprobleme ernsthaft in Angriff zu nehmen“. Esperanto wolle keinesfalls die nationalen Sprachen verdrängen. (m.s.)

Hessische Allgemeine (Kassel)

Radio Peking täglich

20 Jahre sendet nunmehr, neben anderen Radiostationen, Radio Peking auch in Esperanto.

Radio Peking ist täglich zwischen 21 h und 21.30 h MEZ auf folgenden Kurzwellenfrequenzen zu hören:

40,1 m (7470 kHz), 32,0 m (9365 kHz), 30,1 m (9965 kHz). Probieren Sie's mal!

El la mondo

Danlando:

Granda elektrizad-programo

La konstrulaboroj por la elektrizado de la ĉeflinioj en Danlando bone progresas. Antaŭ nelonge la Danaj Ŝtataj Fervojoj (DSB) publikigis la finkonstruajn datojn de la unuaj linioj elektrizotaj. Laŭ tio la linio Helsingør – Kopenhago elektigis la unua por elektra trakcio ekde aŭtuno 1985 kaj la alia linio Kopenhago – Korsør, funkcios sub katenario fine de Majo 1988. La tuta projekto de la elektrizado estu finota en 1999 kune kun la finpretigo de ĉiuj linioj okcidente de la Granda Belto.

Japanio:

Pli alta rapideco sur ekspreslinioj

La Japanaj Ŝtataj Fervojoj (JNR) ekde Marto plialtigos la rapidecon de la Jamabiko-Trajnoj, trafikantaj sur la linio Tohoku – Shinkansen, de nunaj 210 al 240 km h. Samtempe la fina subtera Shinkansen-sekcio tra Tokio ekfunkcios de Omiya al Ueno. La du aranĝoj malpliigos inter Morioko kaj Tokio (Centro) la vojaĝdaŭron al du horoj kaj kvardekminutoj kontraŭ nuntempe kvar horoj. Samtempe ankaŭ la klientoservo sur la Tohoku- kaj Xoetsu- Shinkansenlinio estas plibonigota. Antaŭvidita estas ses pliaj Yamabiko-servoj ĉefe por komercistoj vojaĝantaj sur linio Tohoku kaj kvar pliaj Asahi-servoj por uzantoj de la Yoetsu-linio.

Jugoslavio:

La jugoslavia registaro planas plibonigan konstruadon de la relvojoj en Kroatio. En 1985 oni volas tie investi ĉ. 7,8 miliardojn da dinaroj por renovigado de la fervoja reto. Krome la vagonstoko estu pliigata. Bezonata estas: 250 pasaĝervagonoj, 3500 varvagonoj kaj ankaŭ 21 dizel-motorvagonoj. Krom tio oni mendis 20 elektro- kaj 30 dizel-lokomotivojn.

Pli rapide de Salzburg al Innsbruck

Okazaĵo de internacia rango fariĝis en Marto '82 por la Respubliko Aŭstrio la finpretigo de la interliga kurbotrako ĉe Rosenheim, laŭ kiu ĉiuj trajnoj povas senhalte veturi de Salzburg al Innsbruck, ne tuŝante la stacion Rosenheim. Ĝis fino de la 60-aj jaroj la trajnoj inter Salzburg kaj Innsbruck trafikis sur aŭstria teritorio tra Bischofshofen – Wörgl. Depost Majo 67 la ekspres trajno Transalpin estis prove

kondukata sur germana teritorio kiel „koridor-trajno“ tra Rosenheim. En somero 1969 la Aŭstria Federacia Fervojo (ÖBB) faris kontrakton kun la Germana Federacia Fervojo (DB) pri regula transitrafiko per aŭstriaj elektraj motortrajnoj sur tiu linio. Ĝis nun ĉiuj trajnoj devis halti en Rosenheim kaj ŝanĝi la veturdirekton. La nova kurbotrako interligas apud Rosenheim la relvojojn München-Wörgl-Innsbruck kaj München-Salzburg. Tiu transitlinio estas uzata precipe de Aŭstrio, ĝi estas 60 km pli mallonga kaj la trajnoj ŝparas unu horon kaj duonan kompare al la veturo sur la intern-aŭstria linio. La nova kurbotrako estas nur 1,2 km longa, ĝia plej malgranda kurboradiuso estas 264 m, la maksimume permesita rapideco estas 60 km/h.

Kanado:

Nova tunelo tra la Roka Montaro

La Kanadaj Ŝtataj Fervojoj antaŭ nelonge disdonis du mendojn en valoro de 200 milionoj da kanadaj dolaroj por la konstruo de 14,2 km longa Mount-McDonald-Tunelo tra sub la Rogers-Pasejo en la kanada Selkirk-Montoj. Tiu tunelo estos la kernpeco de la 600 dolar-miliona projekto por plialtigi la kapaciton de la transkontinenta ĉeflinio tra la Roka Montaro inter Calgary kaj Vankuvero. La konstrulaboroj estas finotaj jam en 1988.

Sovetio:

Nova relvojparto en Kaŭkazo funkcia

La konstrulaboroj por la 160 kilometroj longa nova linio inter Marabda kaj Ahaklaki en Kaŭkazo iras flue antaŭen. Tiu projekto necesigos entute 329 artkonstruaĵojn. Instalaĵojn starigotajn en alteco ĝis 2163 metroj. Antaŭ nelonge oni jam transdonis en stacio Marabda unuan 30 km longan sektion al la trafiko.

Busse

Lastmomenta novaĵo:

COTIF esperantlingve

Nova interŝtata reglamento pri la Internacia Fervoja Trafiko ekvalidos la 1an de Majo 1985. Jam unu monaton antaŭe ĝia esperantlingva traduko pretas, dank' al „Jugoslavia Fervojisto“. Interesuloj sin turnu al JAFE, poŝt.fah 563 YU-11001 Beograd.

Ri

Redaktfino por n-ro 3/85 estas la 10. 6.1985